


# Statistika komparoj de diverslingvaj tradukoj de „La eta princo“ de Antoine de Saint-Exupéry



Iom pri la libro „La eta princo“:

Aviadilisto havas paneon en la dezerto. Kiam li sole riparas la motoron, li renkontiĝas kun la eta princo.

Li venas de la asteroido B612 kaj rakontas pri sia vivo, la amo al floro, pri danĝeraj baobaboj kaj pri renkontiĝoj kun strangaj homoj, kiel ebriulo, lanternisto, relŝanĝisto, vizitante aliajn asteroidojn kaj la teron.

Li filozofias pri amikeco, amo, pri diversaj karakteroj de la plen-kreskuloj kaj ilia senco de la vivo.

Famaj estas la frazoj:

Oni bone vidas nur per sia koro.

La esenco estas nevidebla per okuloj.

La libro estis tradukita al pli ol 500 lingvoj.

Ĝi estas formulita en simpla lingvo, komprenebla jam de infanoj.

Ĝi tre taŭgas kompari kaj lerni fremdajn lingvojn.



नन्हा राजकुमार 12      la eta princo 05      mali princ 24  
 el petit príncep 18      маленький принц 22  
 เจ้าชายน้อย 25      პატარა უფლისწული 17      printze txikia 07  
 あのときの王子くん 16      Malý princ 03  
 μικρός πρίγκιπας 10  
 il piccolo principe 15      hoàng tử bé 27  
 הנסיך הקטן 11      küçük prens 26      le petit prince 08  
 micul prinț 23      el principito 13      mały książę 21      小王子 04  
 kis herceg 14      малкия принц 02      väike prints 06  
 شازده کوچولو 20      the little prince 01      der kleine Prinz 09  
 mazais princis 19

- |    |           |    |          |    |          |
|----|-----------|----|----------|----|----------|
| 01 | angla     | 10 | greka    | 19 | latva    |
| 02 | bulgara   | 11 | hebrea   | 20 | persa    |
| 03 | ĉeĥa      | 12 | hindia   | 21 | pola     |
| 04 | ĉina      | 13 | hispana  | 22 | rusa     |
| 05 | Esperanto | 14 | hungara  | 23 | rumana   |
| 06 | estona    | 15 | itala    | 24 | serba    |
| 07 | eŭska     | 16 | japana   | 25 | taja     |
| 08 | franca    | 17 | kartvela | 26 | turka    |
| 09 | germana   | 18 | kataluna | 27 | vietnama |

Diferencoj de la du originaloj: 1943

1946



"I saw the sunset forty-four times!"

Antoine de Saint-Exupéry en Kanado 1943

Un jour, j'ai vu le soleil se coucher quarrante-trois fois!

"Unu tagon mi vidis la sunon subiri kvardek tri fojojn!"

**Mia kontrolo : Ĉiuj tradukoj enhavas la dediĉon al Leon Werth kaj la 27 ĉapitrojn !**  
Kataluna teksto grandparte en la hispana – hungara teksto unu ĉapitro en la ĉeĥa

**Mia kontrolo : Ĉiuj tradukoj enhavas la dediĉon al Leon Werth kaj la 27 ĉapitrojn !**

**Oni diversmaniere tradukis la saman frazon :**

La franca originalo de 1946 :

**Si je vous ai raconté ces détails sur l'astéroïde B 612 et si je vous ai confié son numéro, c'est à cause des grandes personnes. Les grandes personnes aiment les chiffres.**

La traduko al Esperanto de Pierre Delaire (Kanado):

**Se mi rakontis al vi tiujn detalojn pri la asteroido B-612 kaj konfidis ĝian numeron, estas nur pro la granduloj. La granduloj frandas ciferojn.**

La angla traduko de 1943 verŝajne de Katherine Woods (Usono) mallongigis la du frazojn.

**If I have told you these details about the asteroid, and made a note of its number for you, it is on account of the grown-ups and their ways.**

En la germana traduko de gesinjoroj Leitgeb (Svislando) oni evitas la vortojn «asteroido» kaj «detalo»  
Verŝajne oni pensis, ke germanaj infanoj ne komprenas tiujn fremdvortojn!

**Wenn ich euch dieses nebensächliche Drum und Dran über den Planeten B 612 erzähle und euch sogar seine Nummer anvertraue, so geschieht das der großen Leute wegen. Die großen Leute haben eine Vorliebe für Zahlen.**

Por skribi lingvon oni devas lerni la diversajn literojn, ideogramojn (ĉina, japana), ciferojn kaj frazsignojn.

Ekz. Punkto je fino de frazo estas en la ĉina kaj japana lingvoj eta cirklo ◦ kaj en la hindia streketo | !

Ĉina ( 六 一 二 ) kaj taja ( ๖๑๒ ) lingvoj ekzemple uzas aliajn simbolojn por ciferoj ol eŭropaj lingvoj.

Ĉina, japana kaj taja lingvoj ne diferencas inter unuopaj vortoj

Ekz.:


Taja: ที่ฉันเล่าให้คุณฟังถึงรายละเอียดของดาวดวงที่ บี.๖๑๒ และที่ฉันบอกหมายเลขของดาวดวงนี้ก็เพราะพวกผู้ใหญ่ คนพวกนี้เขาชอบตัวเลข

Ĉina: 我如此不厭其煩地詳細說明遊星 B 六一二號並且告訴你它的號碼，乃是由於大人們的緣故。因為大人們喜歡數目字。

Japana: こうやって、しょうわくせい B612 のことをいちいちいったり、ばんごうのはなしをしたりするのは、おとなのためなんだ。おとなのひとは、すうじが大すきだ。

Kontraste - Esperanto kaj multaj aliaj lingvoj disigas vortojn per spacetoj.

La sekva tabelo montras la nombron de la signoj (minuskaj literoj/ideogramoj sen frazsignoj kaj sen ciferoj), kiujn oni devas scii por legi la libron!



Ŝajnas, ke lernado de lingvoj skribita per **latinaj alfabetoj** estas favora. Sed oni devas kalkuli, ke tiuj lingvoj uzas majusklojn kaj minusklojn kaj ke la skriba kaj presita formoj de literoj estas diversaj. Oni povas kalkuli, ke oni devas lerni **kvaroblan** nombron de literoj.

Aliflanke - la hebrea, persa, hindia kaj taja literoj ne diferencas inter minuskloj kaj majuskloj – skribita kaj presita formoj de persa, hindia kaj taja literoj estas identaj.

Do avantaĝo por tiuj lingvoj!



Interese ankaŭ estas la rilato inter la skriba kaj parola lingvo.

Tre **simpla** tiusence estas **Esperanto**.

Ĉiu litero havas unu sonon – ĉiu sono respondas al nur unu litero.

Sola regulo estas, ke la antaŭlasta silabo estas akcentita.

En aliaj lingvoj estas pli komplika.

En la franca oni povas facile diveni la prononcon kiam oni vidas la skribitan vorton sed ne inverse .

En la angla ofte necesas kaj lerni kaj la skribmanieron kaj la prononcon, ĉar simplaj reguloj ne estas.

La ĉina uzas ideogramoj. Ĉiu ideogramo koresponas al unu silabo. Sed la skribo absolute ne havas rilaton al la parolo. Kiam oni lernas la prononcon de ĉinaj silaboj oni devas lerni la kvar sonojn kiujn havas silabo.

La vietnamaj silaboj kvankam skribitaj per latinaj literoj eĉ havas ses diversajn sonojn!



Oni povas multon kompari rilate diversaj lingvoj. Ekzemple:

Kiuj estas la plej oftaj literoj uzataj?

El kiom da silaboj konsistas la teksto?

(Tezo : malpli da silaboj - pli rapida parolo  
Sed estas longaj kaj mallongaj silaboj !)

Kiom da literoj / silaboj havas vorto mezume?



■ Esperanto 1,95  
◆ Germana 1,60  
▼ Turka 2,49  
▲ Angla 1,31  
▶ Franca 1,42

i a e o n  
e n i r s  
i a e n r  
e t a o i  
e i s t a


La 5 plej oftaj literoj

Sed por lerni fremdan lingvon tre gravas la nombro de vortoj, kiujn oni devas lerni.

Mia tezo estas, ke lingvo estas plej facile lernebla kiam oni devas lerni plej malmulte da vortoj!

Por esplori tion, mi nombris la vortojn kaj ĝia ofteco kaj desegnis diagramon komparante la nombro de vortoj kaj la nombro de diversaj vortoj.

Jen la diagramo: La X-akso montras la nombron de diversaj vortoj kaj la Y-akso montras la nombron de la vortoj en la tuta teksto de «la eta princo» .




Oni observas, ke la lingvoj kun pli da vortoj havas malpli da diversaj vortoj kaj inverse la lingvoj kun malpli da vortoj havas pli da diversaj vortoj.

La kialon mi provas demonstri en la sekva tabelo kiu enhavas plurajn tradukojn de la frazo «Mi estas geografo» .

Kiam Esperanto kaj la franca lingvoj bezonas 3 vortojn en la ĉeĥa estas nur 2 vortoj ĉar «jsem» jam signifas «mi estas».

En la turka oni eĉ povas esprimi la tutan frazon per nur unu vorto, nome «coğrafyacığım» !

lingvo	frazo	nombro de vortoj/ radikoj	vortoj entute	diversaj vortoj
Esperanto-radikoj	Mi est'as geograf'o	5	22842	1154
angla	I am a geografer	4	16912	2132
franca	Je suis géographe	3	14363	2612
Esperanto	mi estas geografo	3	12732	2652
ĉeĥa	jsem zeměpisec	2	11526	3188
turka	coğrafyacığım	1	10567	3744



Koncerne la nombro de lernendaj vortoj la lernado de Esperanto ŝajne ne estas favore komparita kun franca, germana, hispana, itala kaj rumana lingvoj. Oni devas lerni ĉ. 2600 vortojn por kompreni la libron «Le petit prince» .  
 Avantaĝa estus ekz. lerni anglajn vortojn (2133) aŭ lerni ĉinajn ideogramojn (1424).  
 La granda avantaĝo de Esperanto estas, ke oni povas facile disdividi vortojn al vortradikoj!  
 La diagramo montras, ke la nombro de Esperanto-radikoj (1154) estas la plej malgranda kompare kun la vortoj de la aliaj lingvoj!

Tion oni vidas en la sekva tabelo kiu listigas kiom da procentoj de la teksto oni konas, kiam oni lernis 500 aŭ 1000 vortoj/radikoj de lingvo. Per 500 Esperanto-radikoj oni jam konas 95% de la teksto sed eĉ per 1000 turkaj vortoj oni nur konas 73% de la teksto.

	Esperanto-radikoj	ĉina	vietnama	angla	Esperanto	franca	ĉeĥa	turka
500 vortoj/radikoj ktp.	95,5%	89,2%	88,0%	85,3%	78,2%	79,6%	68,8%	61,7%
1000 vortoj/radikoj ktp.	99,3%	96,7%	96,6%	92,9%	87,0%	88,0%	79,4%	72,6%
100% (nombro vortoj)	1154	1456	1569	2132	2652	2616	3188	3748
90%	268	509	571	755	1379	1176	2032	2688
80%	120	269	299	319	573	508	1025	1631

## **Konkludo:**

Ĉiuj tradukoj de „La Eta Princo“ havas la saman enhavon – do donas la samajn informojn !  
Notinde estas, ke etaj infanoj ĉie en la mondo lernas paroli kaj kompreni la gepatran lingvon tre rapide.  
Plenkreskuloj pli malfacile lernas fremdajn lingvojn!

Ĉar mi ne konas la prezenciajn lingvojn detale mi ne aŭdacas juĝi, kiu el ili estas la plej facila lingvo.  
Certe la lernado de lingvo dependas inter alie ĉu oni jam konas ion de la fremda lingvo flanke de sia gepatra lingvo ekz literojn silabojn vortojn gramatikajn strukturojn.

## **Esperanto certe estas unu de la plej facilaj lingvoj!**

La du ĉefaj avantaĝoj de Esperanto estas:

- a) Ĉiu litero respondas al nur unu sono. Ĉiu sono respondas al nur unu litero.
- b) La vortoj ne estas fleksitaj kaj aglutinitaj vortradikoj estas facile ekkoneblaj.

Jen kelkaj interretaj paĝoj rilataj al la prezentado:

-----  
<https://www.petit-prince-collection.com/>

<http://www.petit-prince.at/links.htm>

<https://welt-der-sprache.info>

<https://translate.google.com/>

plurlingve

germanlingve

ĝeneralaj informoj pri lingvoj - germanlingve

senkoste uzebla tradukilo por pli ol 100 lingvoj





Dankon, ke vi pacience aŭskultis mian prezentadon!

Ne forgesu!

Neniam kredu al statistikoj, kiujn vi ne mem falsigis!  
Vertraue keiner Statistik, die Du nicht selbst gefälscht hast!  
(populara germana slogano)

Kontakto: [uli.ender@esperanto.de](mailto:uli.ender@esperanto.de)